

Karel Havlíček Borovský (1821-1856) – kontribuo al la 160-a datreveno de lia forpaso

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
la 24-an de februaro 2016

La 31-an de oktobro 1821 naskiĝis en familio de komercisto kaj eksa edukistino de nobelaj infanoj en bohemia vilaĝo Borová apud tiama Německý Brod (nuntempa Havlíčkův Brod) Karel Havlíček. Li estis la dua infano de la familio, ĉar lia frato du tagojn post sia naskiĝo mortis. Ankaŭ komenco de vivo de Karel estis drameca, ĉar li longtempe post naskiĝo ne spiris kaj oni devis lin revivigi. Verŝajne pro tio li dum sia infaneco estis malfacile edukebla.

Alia drameca situacio okazis, kiam li estis 3- aŭ 4-jara. Lia patro hejme nutrigis siajn kolombojn per kuiritaj terpomoj. Malgranda Karel malfeliĉe tretis sur terpomon, glitis kaj rompis sian dekstran piedon. Li devis kuŝi tri monatojn ĉe parencoj, kiuj zorgis pri li, en la urbeto Přebyslav.

En la jaro 1826 kvinjara Karel eklernis en baza lernejo en Borová. Li havis bonan instruiston (Antonín Línek) kiu baldaŭ eksciis, ke Karel, kiu ofte estis obstina, neobeema kaj eĉ agresema, estas talenta lernanto. Krom tio Karel havis du bonajn adultajn amikojn. Romkatolika vikario Jan Brůžek kaj subparoĥestro Serbousek gvidadis la knabon tra la naturo.

En la jaro 1830 Karel ekstudis en la urbo Jihlava, por ellerni la germanan lingvon. Li ne sentis tie bone, ĉar samklasanoj mokis lin kaŭze de lia malbona scio de la germana lingvo kaj direktoro Oller ne ŝatis ĉeĥojn. Tial Karel en la jaro 1832 foriris en mezlernejon (Německý Brod). En la mezlernejo, kie instruis monaĥoj el proksima monaĥejo de Želiv, patriota pastro Václav Divok kuraĝigis la studentojn skribi ĉeĥlingvajn versojn kaj prozon. Karel Havlíček versis, sed nur germane. Li ne estis sukcesa studento – nur antaŭ fino de studado li pliboniĝis danke al memstudado.

Post fino de la mezlerneja studado Karel foriris en Pragon, por prepari sin du jarojn por universitata studado. Tiam li estis tre ŝparema, ne vizitadis gastejojn, ne trinkadis bieron, por havi monon por aĉetado de lernolibroj, kaj fervore li studis. Verŝajne tiam li tralegis verkojn de profesoro Bernard Bolzano (1781-1848), kiu estis bonega natursciencisto, pedagogo kaj filozofo. Brava viro, al kiu romkatolikaj eklezianoj riproĉis 112 herezojn, ĉar li proksimiĝis al la Dio danke al sia logiko kaj sincereco, havis la sloganon „Kredi sen la kredo!“ Li instruis, ke la religio kaj la kredo estas utilaj, ĉar plibonigas animojn de homoj. En sia libro „Pri la plej bona ŝtato“ (1831, „Das Büchlein vom besten Staate“) li proponis idealan aranĝon de ŝtato. Bolzano estis devigita forlasi universitaton jam en la jaro 1820, sed liaj opinioj influis multe da studentoj, kiuj lin ŝatis kaj fervore vizitadis liajn prelegojn.

Patro volis, ke Karel fariĝu juristo, sed Karel celis al laboro de pastro, ĉar li volis servi al popolo. En la jaro 1840 Karel Havlíček ekstudis en romkatolika jezuita seminario en Klementinum (Prago). Sed tie li baldaŭ eksciis, ke ĉirkaŭ li floras hipokriteco kaj sensenca dresado. Ĉu tio estas taŭga preparado por servo al Dio kaj popolo? Studento Karel en la seminario kritikis katolikan eklezion, lernis la rusan kaj versis ĉeĥlingve. Post unu jaro li devis fini studadon kaj neniam fariĝis pastro.

Li ekvolis fariĝi instruisto, tial li lernis diversajn slavajn lingvojn kaj multe vojaĝis, plej ofte piede. Kun siaj amikoj li vagadis tra Bohemio, vizitis Pollandon (Kraków, Nowy

Sącz) kaj Slovakion (Kežmarok, Liptovský Svätý Mikuláš). Sed en Prago tiam kiel nun abundis junaj viroj, kiuj ne finis studadon, kaj libera loko de instruisto por Havlíček mankis.

Kiam li en la jaro 1842 vane serĉis laboron en Prago, slovaka kaj ĉeĥa patrioto Pavel Josef Šafařík proponis al li labori en Ruslando. Tiam multe da edukitaj ĉeĥoj en Aŭstrio naive pensis, ke la rusa caro estas bonkorulo kaj volas defendi ĉeĥojn kontraŭ germanoj. Kelkaj homoj eĉ diskutis, ĉu oni ne povus skribi ĉeĥajn tekstojn uzante rusan alfabeton (azbukon). Ankaŭ Karel Havlíček, kiu aldonis al sia nomo la duan familian nomon Borovský (laŭ vilaĝo Borová, kie li naskiĝis), forveturis en Ruslandon kun multe da idealoj. Survoje li devis atendi pasporton en la galicia urbo Lvov. Li loĝis du monatojn ĉe ĉeĥa verkisto Karel Vladislav Zap kaj lernis la polan lingvon. Sed jam en Lvov li observis, ke eĉ inter slavaj nacioj ne ĉiam estas bonaj rilatoj: poloj premis rutenojn, rusoj premis polojn kaj tion utiligis germanoj, kiuj premis ĉiujn slavojn.

La 5-an de februaro 1843 Karel Havlíček Borovský eklaboris en familio de rusa profesoro Ŝevirjev kiel hejma instruisto de lia sepjara filo. La profesoro estis fanatika slavamanto. Havlíček post alveno sentis sin kiel en slava paradizo. Ĉio estis nova por li, ĉio al li plaĉis. Sed diferencoj inter Aŭstrio kaj Ruslando estis grandegaj. Ekzemple servuteco en Aŭstrio estis ĉesigita jam en la jaro 1781 (de Jozefo la 2-a Habsburga la 1-an de novembro 1781), tial generacio de Havlíček jam elkreskis kiel liberaj homoj. En Ruslando la servuteco daŭris ankoraŭ 80 jarojn – ĝis la jaro 1861!

Demokrato Havlíček, kiu falis en vivantan subĉielan muzeon de feŭdalismo, rigardis, ke rusaj nobeloj kondutas malbone al siaj servutuloj („animoj“). Li eksciis, ke la cara regado estas pli malbona ol regado de Francisko Jozefo la 1-a. Rusaj komercistoj imitis fremdajn kutimojn, sed estis needukitaj. Ili havis multe da mono, sed neniun estetikan senton. Iliaj edzinoj kaj filinoj estis terure dikaj. Terura estis alkoholismo, kiu estis inter rusoj tre disvastiĝinta. Rusaj soldatoj estis instruitaj de ortodoksaj pastroj, ke se ili falos, ili iros rekte en la ĉielon. Ortodoksaj pastroj servis al siaj propraj interesoj kaj fervore apogis la caron. Havlíček eksciis, ke la caro en Ruslando regas super eklezio kaj la eklezio servas al li kiel al vivanta dio. (Poste Havlíček uzis tiun motivon en sia satira poemo „La bapto de caro Vladimir“.)

En Ruslando Havlíček ekkonis verkojn de granda ukraina, ruse verkanta aŭtoro Nikolaj Vasiljeviĉ Gogol (1809-1852, ukraine: Mikola Vasiljoviĉ Hohol). Profesoro Ŝevirjev ne ŝatis Gogolon kaj atakis lian teatran komedion La Revizoro (ruse: Ревизор) dirante, ke tio estas nur kruda farso, sed Havlíček bonege ekkomprenis opiniojn de Gogol kaj eĉ ĉeĥigis ekzemple liajn rakontojn „La Nazo“ («Нос»), „La Mantelo“ («Шинель») kaj lian romanon „Mortaj Animoj“ («Мёртвые души»), kiuj ankaŭ ne plaĉis al liaj gastigantoj.

Havlíček ŝatis skribi epigramojn. Li diradis, ke epigramoj estas ujetoj, en kiujn li enverŝas sian koleregon. En Ruslando li versis du trionojn de siaj epigramoj. La epigramoj estis dediĉitaj al eklezio, reĝo, patrujo, muzoj kaj la mondo. Li ankaŭ ĉeĥigis epigramojn de romiaj aŭtoroj (Juvenalis, Martialis).

En la familio de la profesoro li ne sentis sin bone kaj ankaŭ rusoj baldaŭ lin malŝatis, ĉar li ĉion kritikis kaj havis opiniojn, kiuj ne plaĉis al etburgoj. Havlíček eĉ timis, ke pro siaj opinioj li estos sendita en Siberion. Bonŝance lia problemo estis eksterordinare solvita. Filo de la profesoro havis malriĉan kuzon. Havlíček edukis ambaŭ knabojn sammaniere, nerespektante diferencojn inter riĉulo kaj malriĉulo, kaj tio ne plaĉis precipe al edzino de la profesoro. La riĉa knabo vangofrapis sian kuzon, kiu eĉ ne aŭdacis defendi sin kontraŭ li. Temperamenta demokrato Havlíček vangofrapis orgojlan riĉulidon – kaj devis foriri. Li revenis en Aŭstrion, kie li eksciis, ke lia patro mortis.

En la jaro 1845 Havlíček fariĝis redaktoro de la ĵurnalo Pražské noviny (Ĵurnalo de Prago) kaj ĝia aldono Česká včela (Ĉeĥa Abelino).

En la jaro 1845 Havlíček eldonis artikolon „Obrazy z Rus“ (Bildoj el Ruslando“), kie li priskribis siajn impresojn, en la ĵurnalo Česká včela (Ĉeĥa Abelino) kaj en la jaro 1846 en la ĵurnalo Časopis Národního muzea (Ĵurnalo de Nacia Muzeo). Multe da ĉeĥaj slavamantoj estis ŝokitaj, ĉar Havlíček atakis la ideon de tutslavismo, la rusan caron kaj la ortodoksan eklezion, kiu al la caro fervore servis.

Havlíček, kiu la 4-an de marto 1848 edziĝis kun Julie Sýkorová, filino de ĉasgardisto, travivis la plej belan periodon de sia vivo. Anstataŭ senpolitika ĵurnalo Havlíček ekredaktis la ĵurnalon Národní noviny (Nacia ĵurnalo), kie li povis propagandi ĉeĥan liberale-demokratan programon. Pro aŭdacaj politikaj artikoloj li estis malliberigita. Bonŝance li estis deputisto kaj danke al sia deputista imuneco li estis baldaŭ liberigita.

Havlíček ne ŝatis revoluciojn kaj tial ne partoprenis en komenco de ĉeĥa revolucio en la jaro 1848. Malŝatata aŭstra ŝtata kanceliero Klemens Lothar Metternich (1773-1859) devis abdikii, sed la revolucio ne estis sukcesa. Ĉeĥoj, kiuj revis pri libereco (en kadre de aŭstra monarĥio), ne volis kunlabori kun aliaj nacioj, kiuj ankaŭ volis atingi liberecon. Vane juda kuracisto kaj poeto Siegfried Kapper (1820-1879) versis ĉeĥlingve, ke ankaŭ judoj revas pri libereco kaj volas batali flanke de ĉeĥoj: „Mi estas filo de judoj! ... vi ne scias tristajn afliktojn, ami la patrujon estante en ĝi fremdulo!“ (Syn já Židů jsem!... ty neznáš boly rmutné, milovat vlast a být v ní cizincem!“) – Eĉ tiel granda demokrato kiel Havlíček kapablis skribi malafable kontraŭjude: „Tial, kiu volas fariĝi ĉeĥo, tiu devas ĉesi esti judo.“ („Pročež musí, kdo chce být Čechem, přestat být Židem.“)

Ĉeĥa nacionalismo estis tiel granda, ke ĉeĥoj en la jaro 1848 kunlaboris nek kun germanoj nek kun hungaroj. Ili ne kunlaboris eĉ kun ilia plej proksima najbara slava nacio – moravianoj. Tial malbone preparita kaj ĥaosa revolucio, dum kiu en stratoj de Prago falis multe da homoj, precipe studentoj, estis sen helpo el Moravio facile venkita de spertaj soldatoj de aŭstra generalo Windischgrätz.

La 24-an de decembro 1848 al geedzoj Havlíček naskiĝis ilia unusola filino Zdena Havlíčková (1848-1872).

Post venko super la revolucio plifortiĝis absolutismo de la juna aŭstra imperiestro Francisko Jozefo la 1-a (1830-1916). Ministro de interaj aferoj fariĝis Alexander Bach (1813-1893). Oni ofte parolas pri „absolutismo de Bach“, sed fakte tio estis absolutismo de la juna imperiestro, kies rekta subalternulo estis ĉefo de polico kaj fondinto de ĝendarmaro Johann Franz barono Kempen von Fichtenstamm (1793-1863).

La reĝimo permesis naciajn folkloron, sed malpermesis politikajn agadojn. Homoj povis labori, amuziĝi, sed ne devis enmiksiĝi en politikon. Sed Havlíček ne povis silenti. Li denove ne obeis (kiel antaŭe en lernejo), laŭte kritikis absolutismon, sed ankaŭ tutslavismon kaj etburĝan kvazaŭpatriotismon. Kaŭze de sia privata „milito kontraŭ stulteco kaj kolero“ (esprimo el lia epigrama pri si mem) Havlíček havis multe da malamikoj. Sed la ĉeĥa popolo lin amis, ĉar kuraĝa redaktoro kapablis skribi eĉ tion, pri kio aliaj ne aŭdacis publike paroli.

En aprilo 1849 Havlíček estis akuzita kaj devis defendi sin antaŭ juĝo. Li sukcesis, sed la 28-an de aŭgusto 1849 li estis denove malliberigita – por du semajnoj. Lian ĵurnalon Národní noviny aŭstroj malpermesis.

Ekde la 8-a de majo 1850 li eldonis la ĵurnalon Slovan (Slavo), en kiu li kritikis ne nur absolutismon, sed ankaŭ romkatolikan eklezion, ĉar romkatolika eklezi-estraro post a revolucio fervore apogis la imperiestron. La reĝimo konfiskis eldonojn de la ĵurnalo kaj eĉ provis korupti ĝian redaktoron. Oni ofertis al Havlíček 4 000 florinojn kaj bonan monatan

salajron, se li skribos por la reĝimo. Sed Havlíček ne estis koruptebla. Li mem ĉesis eldonadon de Slovan, kies lasta numero estis eldonita la 14-an de aŭgusto 1851. Li volis iomete ripozi kaj precipe protekti sian familion, kiu el Kutná Hora translokiĝis en Německý Brod. Lia edzino Julie estis tre malsana (tuberkulozo). Sed liaj malamikoj akuzis lin kaj lian tipografon pro du artikoloj: „Kial mi estas civitano“ („Proč jsem občanem“) kaj „Administrado de komunumaj aferoj“ („Správa záležitostí obecných“). Havlíček bravure defendis sin kaj sian tipografon kontraŭ juĝo en Kutná Hora, sed tio estis lia lasta venko en batalo kontraŭ absolutisma reĝimo.

La 13-an de decembro 1851 ordonis la 21-jara imperiestro Francisko Jozefo la 1-a Havlíček-on malaperigi el Bohemio. La deportadon aranĝis Kempen. La 16-an de decembro nokte aŭstra polica komisaro Franz Dederer kun regiona estro kaj ĝendarmoj nokte alvenis en domon de Havlíček. Ili vekigis la redaktoron kaj montris al li dokumenton de Bach. Havlíček devis esti deportita en nekonatan lokon de la monarĥio. Havlíček nur sukcesis rapide adiaŭi sian edzinon Julie, filinon Zdena kaj fraton Filip.

La loko estis episkopa tirola urbeto Briksen (Brixen), kie tiam loĝis 2 700 loĝantoj. Havlíček de tie ne povis fuĝi, ĉar inter Alpoj estis nur unu ŝoseo. Baldaŭ al li povis alvenadi lia edzino kun malgranda Zdena. La familio en Briksen ne suferis de malriĉeco, ĉar Havlíček ricevadis monate monon de ŝtato (500 florinojn, tio estis tiel granda monsumo, kiel salajro de aŭstra oficisto). Li eĉ havis purigistinojn kaj manĝis manĝaĵojn el luksa hotelo „Zum Elefanten“ („Ĉe Elefantoj). Sed li en Briksen suferis psiĥe, ĉar al li mankis kontaktoj kun ĉeĥoj, amikoj kaj inter vizitoj de lia edzino ankaŭ kun familianoj. Lia edzino suferis de tuberkulozo kaj ankaŭ Havlíček de ŝi infektiĝis. Li povis forlasi Briksenon nur post promeso, ke li ĉesos ĵurnalistan laboron (1855). Por la redaktoro estis la promeso tre humiliga, sed li faris tion, por baldaŭ renkotiĝi kun siaj edzino kaj filino. Kiam li revenis en Bohemion, li eksciis, ke lia edzino jam mortis de tuberkulozo kaj estas entombigita. Li ne devis eldoni ĵurnalojn kaj multe da eksaj amikoj lin evitis. Printempe 1856 li malsaniĝis de tuberkulozo kaj la 29-an de julio 1856 mortis. La 1-an de aŭgusto 1856 li estis en Prago entombigita. Multe da homoj lastfoje adiaŭis lin, sed ili tiel timis la policon de Kempen, ke neniu el ili aŭdacis paroli pri Havlíček. Plej brave agis ĉeĥa verkistino Božena Němcová (1820?-1862), kiu donis en liajn manojn mirabilon kaj ornamis lian ĉerkon per laŭra krono kun dornoj. (Ŝi ne estis pro tio punita, sed ŝia edzo Josef Němec estis admonita.)

Filino Zdena loĝis en familia domo en Německý Brod, kie ŝi mortis de tuberkulozo kiel 24-jara needziĝinigitaj virino en la jaro 1872.

Karel Havlíček Borovský estis estimata jam dum sia vivo. Homoj kaŝe legis precipe liajn tri grandajn satirojn: „La reĝo Lávra“ („Král Lávra“), „Tirolaj elegioj“ („Tyrolské elegie“) kaj „La bapto de caro Vladimir“ („Křest svatého Vladimíra“).

Motivo de „La reĝo Lávra“ estas transprenita el irlanda fabelo: la reĝo Lávra, kiu havas longajn, azenajn orelojn, kaŝas ilin sub sia longa harararo kaj ordonas ekzekuti siajn barbistojn, por ke neniu eksciuj lian sekreton.

En „Tirolaj elegioj“ Havlíček humure priskribis sian deportadon.

En ambaŭ satiroj li trafis mokis absolutismon. Sed la plej grava satiro estas „La bapto de caro Vladimir“. Mi tralegis ĝin en Esperanta traduko de Tomáš Pumpr. Havlíček konis tekston de la malnovrusa kroniko de Nestor. En la jaro 988 rusa princo Vladimir, kiu akceptis kristanan kredon de greka ortodoksa eklezio, ordonis faligi statuon de la pagana dio Perun (dio de la fulmotondro), ligi ĝin al la vosto de ĉevalaĉo kaj ĵeti en la riveron Dnepro. En la poemo de Havlíček eĉ Dio estas nur cara servisto. Li ne volas tondri dum cara festo anstataŭ artilerio kaj elpelas cargardiston. Tial li estas juĝita de armea tribunalo. En absolutisma ŝtato

eĉ Dio povas esti juĝita. La Dio kaj ateisto (ĵurnalisto) estas kondamnitaj al la sama puno: morto en la rivero Dnepro. Post morto de Perun en Ruslando ekestas sendieco kaj eklezianoj petas la caron doni al ili novan dion. Al absolutisma reĝimo taŭgus ĉiu, kiu kapablu timigi kamparanojn, por ke ili silentu kaj laboru por la caro. Havlíček en sia satiro ne mokas bonajn kredantojn, sed absolutismon kaj ĉiujn ruzulojn, kiuj el naiveco de aliaj kreis bonegan metion por si mem. Diversaj eklezioj volas plenumi vakantan lokon post Perun kaj kalumnias unu la alian.

La satiro ne estas finita, sed tio ne malgrandigas ĝian signifon. Trompisto kaj hipokrituloj troviĝas eĉ en la 21-a jarcento. Alkoholismo neniiĝas vivojn de homoj ne nur en Ruslando, sed ankaŭ en nia lando. Naivuloj denove serĉas „helpon“ oriente. Super Ruslando nun denove regas iu Vladimir. Nur nova Havlíček Borovský al ni trege mankas.

Rekomendita literaturo

- HAVLÍČEK BOROVSKÝ, K. 1967: La bapto de caro Vladimir, 1-a eld., Prago, Paco, organo de Mondpaca esperantista movado, n-roj 167-168, Prago, Knihotisk, 20 paĝoj (*esperantigis Tomáš Pumpr*).
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1997: Toulky českou minulostí, 1-a eld., Prago, Baronet kaj Via Facti, 230 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1998: Toulky českou minulostí, 1-a eld., Prago, Via Facti, 222 paĝoj.
- KREJČÍ, J. 1919: Siegfried Kapper, 1-a eld., Prago, Jednota, 29 paĝoj.
- KRONUSOVÁ, V. 1981: Karel Havlíček Borovský. Vojna s hloupostí a zlobou. 1-a eld., Prago, Máj, 304 paĝoj.
- MORAVA, J. 1986: C.k. disident Karel Havlíček. 1-a eld., Toronto, Sixty-Eight Publishers, Corp., 413 paĝoj.
- ZBOROVSKÁ, Z. 2008: Karel Havlíček Borovský (1821-1856). Životopis, epigramy, novinové články. 1-a eld., Havlíčkův Brod, Muzeum Vysočiny, 77 paĝoj.